

# Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

## La Muzeo/Oficejo-projekto oficialigita — la Ekstra Ĝenerala Membrokunveno je 2019-08-24 —

Sibayama Zyun'iti, la Prezidanto de NPO Esperanto-Jokohama

La Nefitocela Organizo Esperanto Jokohama okazigis la Ekstran Ĝeneralan Membrokunvenon en la 24a de aŭgusto, en la kutima kunvenejo (Kanagawa Kenmin-Sentaa), kaj per la plimulto da voĉoj akceptis 4 proponojn. Ili estas ĝenerale por la fondo de la Muzeo/Oficejo de Esperanto Jokohama, per utiligo de granda ofermono farita (pri kio legu la artikolon en la n-ro 350, julia n-ro).

[El entute 54 membroj, 20 efektive vizitis la kunvenon. 17 esprimis anticipe sian opinion pri la proponoj, kaj 4 mandatis, do la kunveno plenumis kvorumon.]

### Propono 1: Oficialigo de la “Muzeo/Oficejo-Projekto”

S-ro Doi Hirokaz, estro de la projekto-teamo pri Muzeo/Oficejo-Projekto, klarigis la situacion, kaj prezentis vojon por malfermi Muzeo/Oficejon. Por tio ne sufiĉas la akceptita ofermono, kaj ni devas plukolekti monon.

Pri tio estis esprimita, aŭ milda timo, ĉu nia rondo kun ĉefe ne-junaj membroj povos pluteni tian muzeon,

aŭ forta kontraŭstaro, ke la plano estas ne realisma kaj la foruzo de mono por tia projekto ne havas sencon.

S-ro Sibayama Zyun'iti, la prezidanto de la NPO pluklarigis, ke la jara plano kaj buĝeto de la NPO estu amendita por akcepti la projekton.

[Rezulto: 29 poraj, 4 kontraŭaj, kaj 6 rezervaj voĉoj, do akceptita.]

### Propono 2: Starigi regularon por financa administrado

Estu starigita la kompetentolimo de individua estrarano / estraro de Esperanto Jokohama / neceso alvoki ĝeneralan membrokunvenon, ktp por elspezado. Estu ebla starigi specialan kason pro

speciala projekto.

[Rezulto: 35 poraj, 3 kontraŭaj, kaj 2 rezervaj voĉoj, do akceptita.]

### Propono 3: Starigi Fonduson por la muzeo/oficejo-projekto

Estu starigita fonduso (per la sistemo de speciala kaso laŭ la Propono 2), kaj komenci monkolekton.

[Rezulto: 30 poraj, 3 kontraŭaj, kaj 6 rezervaj voĉoj, do akceptita.]



- Eldonas Sibayama Zyun'iti ■ Redaktas Esperanto Jokohama: Sibayama Zyun'iti, Noriko
- Adreso: Nisisiba 4-17-9, Kanazawa-ku, Yokohama-si, Kanagawa-ken, Japanio (JP-236-0017)
- Telekopio: +81-45-785-5458
- Redaktejo: tamtamo@googlegroups.com ■ TTT-ejo: <http://www.esperanto.yokohama/>
- Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-j (Jokohama Esperanto-Rondo)

## Propono 4: Nomumi specialajn kas-konsilantojn

Kiel priskribita en la Propono 2, granda monsumo bezonas aprobon de la ĝenerala membrokunveno, sed se eventuale granda sumo estas urĝe bezonata (ekzemple se domo por muzeo/oficejo estos trovita, ni devas rapide reagi). Por tio, ne nur 5-kapa estraro,

sed kas-konsilantoj konsentu. Al tiu pozicio, ni nomu 2 eks-prezidantojn de Jokohama Esperanto-Rondo, nome s-ino Aida Yayoi kaj s-ro Iwaya Mituru.

[Rezulto: 34 poraj, 3 kontraŭaj, kaj 2 rezervaj voĉoj, do akceptita.]



([KK]=nia kutima kunvenejo, nome Kanagawa-Kenmin-Sentaa, proksime de la Stacidomo Jokohama)

### Okazis

**\*jul. 27[KK] Komuna Klaso**

Kunvenis 6, kaj sub gvido de s-ro Fuse Kentarou, ekzercis sin pri Esperanta konversacio uzante paŭsadon de sufloranto.

### Niaj Planoj

**\*sept. 28, 29 [KK] Ekspozicio ĉe Firo de Civitanaj Agadoj**

Multaj grupoj, inkluzive nin, kunvenantaj en la KK ekspoziciosian agadon.

**\*okt. 5 [KK] Hama-Ronda Vespero**

Ges-roj Kleemann el Germanio vizitos nin, kaj rakontos precipe pri la vojaĝo al Tanzanio, Afriko.

## Leteroj

**de Trevor Steele (Aŭstralio)**

Karaj samideanoj, estis neatendita plezuro legi kelkajn recenzojn de mia novelaro *Australia felix* sur viaj paĝoj, Mi esperas, ke la libro pliproksimigis Aŭstralion al la legintoj, kiujn mi salutas tutkore.

**de Josip Pleadin (Kroatio)**

Karaj samideanoj,

Hodiaŭ venis via gazeto "Novajoj Tamtamas" n-ro 350 (julio 2019), en kiu frontpaĝe vi respondis al nia demando. Dankon pro via spirita apogo!

Intertempe la domo de Dokumenta Esperanto-Centro estas ekstere termike izolata. Ni sendas al vi foton de la nuna stato de konstruado. Malgraŭ multaj problemoj, ni progresas kaj baldaŭ atingos la celon!



**de José Antonio Vergara (Ĉilio)**

Karaj jokohamanoj, koran dankon pro la sendado de via organo Novajoj Tamtamas.

Mi nun skribas al vi kun varme amika entuziasmo, ĵus leginte en la lasta n-ro (350) la informon pri la grandioza donaco kiun iu bonkorulo faris subtene al la E-muzea projekto. Kiel ĝojiga sukceso!

Mi ĉiam tralegas kun sincere intereso ĉiun numeron de via bulteno, ekz. la represon de tiu artikolo el la jaro 1984 pri la malfacile komprenebla kazo de s-ro Masakazu Ootani, kiu tiom intense okupiĝis pri esperanto ĝis la grado neglekti sian familion.

### El la Redaktanto

Pardonon, tiu ĉi numero estas nur 2-paĝa.



Sibayama Zyun'iti